

“Não Há Ideologia Superior à Solidariedade”

UNIÃO PLANETÁRIA

Criando novos paradigmas na televisão brasileira, a qualidade UP se apresenta em 56 transmissoras, 46 cidades, sendo 18 capitais.

Confira a programação de

www.uniaoplanetaria.org.br

Informações:

(61) 3368-2204 / 0800 644-8484

Assista as séries:

A Construção da Paz Mundial, Arte - Caminho do Despertar, Descobrimo o Yoga, Em Buca do Autoconhecimento, Entre Amigos: Conversando com o



#10 VINTRO2006

Brazilasperantistajunularaorganizo BEJO



Momenton!

#10 VINTRO2006

A diaŭ, amikoj!

Jes, adiaŭ! Mi, post pli ol du jaroj kiel ĉefredaktoro de tiu ĉi revueto, adiaŭas vin. Jen vi havas ĉe-mane la lastan eldonon, kiun mi redaktas. Estis tre riĉa sperto por mi kaj mi esperas ke ankaŭ por vi, karaj legantoj. Mi multege lernis kaj kredas ke atingis la celojn. Ni sukcesis plibonigi nian revueton enhance kaj aspekte. Mi multege dankas al ĉiuj kontribuantoj, kiuj dum tiu periodo, ĉiam amike kaj atenteme sendis artikolojn kaj raportojn kontribue al nia "Momenton!" Speciale mi dankas al Roger kaj al James - sen ili mi neniam povus kompletigi mian taskon.



Mi tre ĝojas pro tiu evoluo kaj nun la revuo eniras novan fazon. Ekde nun ĝi sendiĝas al publiko ne-esperantista. Danke al partnereco inter BEL kaj UP (União Planetária) "Momenton!" iras al abonantoj de la televidkanalo de tiu ĉi lasta organizaĵo. Pro tio, ni decidis profiti tiun oportunon por reklami pri Esperanto per portugallingvaj paĝoj por ke la ordinara publiko povu iom familiariĝi kun la junulara E-movado.

Nun en tiu nova fazo, vi havos novan redaktoron. Redaktorinon fakte! Renata Ventura, via nova redaktorino estas persono kiun mi vere fidis por tiu tasko. Mi ankoraŭ ne tiom frue malaperos de la movado. Vi ankoraŭ aŭdos pri mi dum iom da tempo.

Dankon al vi, karaj legantoj.
Septembre/2006

Saluton! Mi estas Renata Ventura, estas 21-a jaraĝa kaj loĝas en Rio de Janeiro. Mi diplomigis pri Ĵurnalismo ĉi-decembre kaj mi esperas ke mi povos kontentige plenumi mian taskon. Mi ĝojos se mi sukcesos daŭrigi je la sama nivelo, kiun ni havis ĝis nun.

Mia espero estas ke ni sukcesu instigi la junularon partopreni la enhavon de "Momenton!" sentante sin kiel anoj de la skipo, kunlabore.

Renata Ventura
Ĉefredaktoro

MOMENTON > Kvarmonata revuo de BEJO.

REDAKTADO kaj **ARTO** | Rogener Pavinski, Ribeirão Preto.

ARTO kaj **PRILABORADO** | Roger Borges, Madrid.

SUPERRIGARDO | Ísis Okabe Piton, Campinas.

REVIZIADO | James R. Piton, Campinas.

DISTRIBUADO | BEJO, fondita en 1967 (Landa Sekcio de TEJO ekde 1968).

Caixa Postal 1097 13012-971 Campinas, SP

momenton@gmail.com.br

www.esperanto.org.br/bejo

BEJO - nova estraro

2006-2008

Elektita por agi dum la periodo de julio 2006 ĝis julio 2008 dum la 26-a brazila esperanta junulara kongreso en la urbo campinas-sp, la nova estraro konsistas el prezidanto, sekretario, kasistino kaj fiska konsilantaro. La aliaj oficoj estos difinitaj laŭ la aktuala estraro kune kun la aktivuloj.



Nuntempe la BEJO estas reprezentata de:
 Prezidanto: **felipe de oliveira queiroz** - florianoópolis-sc
 Sekretario: **damiana britto fortaleza-ce**
 Kasisto: **rosa maria mattos** - rio de janeiro-rj

En la foto: Rosa, Felipe, Damiana, Lucas (Momenton!), Renata (Momenton!) kaj Ricardo (BEJO-paĝo)

Vortoj de la **NOVA** PREZIDANTO

Salutegon, miaj karaj geamikoj, sciuvi ke la Brazila Esperantista Junulara Organizo nun vivas novan fazon. Unue, ĉar ekde la lasta BEJK, okazigita en la urbo Campinas-SP, ĝi nun estas efektive departemento de Brazila Esperanto-Ligo. Due, ĉar ankaŭ ekde tiam la estraro ŝanĝiĝis. Trie, okazis la konkurso BEJO-Ataŝeo, kaj la venkinto, Lucas Reis, vojaĝos eksterlanden kaj studos tie kiel premio, krom disvastigi pri Brazilo, BEJO-n, kaj poste povos diri "Mi havis ŝancon vojaĝi eksterlanden, studis

tie, riĉigis mian kulturon kaj mian vivresumon danke al Esperanto, do pro tio kaj multaj aliaj aferoj oni ne diru ke ĝi estas senutila". Kaj finfine, ĉar venontjare BEJO kvardekjariĝas. Do, la nuntempo estas tute historia por ni ĉiuj. Kiel la nova prezidanto, mi volas danki al ĉiuj kiuj min apogis, dum-kongrese aŭ ne. Mi akceptis tiun taskon ĉar mi sentis ion, iel, kiu diris ke nun estas mia vico, ke mi estas preta plenumi tiun taskon kaj plibonigi nian karan organizon.

Felipe Queiroz
 BEJO - Prezidanto

Kompreneble kiu ne konas min meritas prezenton. Mi estas Felipe Queiroz, esperantisto ekde la 2002-a jaro, nun 21-jaraĝa, eks-studento pri datum-procesado ĉe la Fakultato Teknologia el Santosa Ebenajo (FATEC-BS), eks-studento de teknika kurso pri turismo, kaj finfine studento pri geografio ĉe la Universitato Federacia de Santa Catarina (UFSC). Vi vere povas supozadi, ke mi loĝas en la urbo Florianópolis, la nomata "magia insulo", tamen surprize mi ne scias kie mi loĝas. Mi eksplikas: diras studemuloj pri tiu fako, ke la loĝado estas subjektiva sento, kaj okazas ke mi ĉiam loĝis en la urbo Santos antaŭ studi geografion, kaj ofte veturas inter unu urbo kaj alia, vere ofte. Do, mi ne scias ĉu mi loĝas en Santos kaj studas en Florianópolis aŭ ĉu mi loĝas en Florianópolis kaj oftege vojaĝas al Santos. Iel ajn, mi disvastigas kaj instruas esperanton en mia universitato kaj, kiam eblas, mi ankaŭ helpas la aliajn e-amikojn de Santos.

La junulara movado al mi estas gravega, ĉar ĝi estas vere baza movado. Kiam Esperanto konkeras gejunulojn agemajn favore al la internacia lingvo, ĝi ankaŭ gajnas plej eble, konsekvence, batalemajn adoltojn kaj maljunulojn, kaj tiuj havas ankaŭ pli da tempo por influi aliajn personojn por ke ili ekesperantiĝu. Do, kiel diris mi, ĉi tiu movado estas vere grava, tamen ankaŭ estas vere malfacila: mi, kiel studento pri geografio, bone supozas pri la grandeco de nia lando, kaj bone komprenas la malfacilaĵon kiu konsistigas zorgi pri brazila organizo, alvoki pli da personoj, interŝanĝi informojn de la plej diversaj regionoj, kaj mi ankaŭ devas kompreni la fakton, ke la gejunuloj estas ĝenerale tre okupataj de lernejo, fakultato, kursoj, dungoj, ĉio tute vere malfacilas. Tamen, tiu defio, tiel kiel la aliaj, ekzistas por ke oni laktu kontraŭ ĝi, kaj jen ĉi tie ne nur mi, sed la tuta estraro, ĉiuj kunordiganto, ĉiuj geamikoj kaj ankaŭ vi, estimata legant(in)o, por nin apogi. Proponoj, sugestoj, helpoj, konstruigaj plendoj, ĉio estas bona.

Mi deziras, plenkore, ke kiel geesperantistoj, ni ĉiuj pliboniĝu dum ĉi tiu estrartempo. Gramatike, vortprovize kaj age. Ke komenciĝu pli da universitataj grupoj, pli da junularaj grupoj, pli da e-kursoj vere bonaj en la tuta Brazilo, pli da e-rimodoj, pli da ĉio, por ke ni vere progresu! Miaj provoj kaj pripensoj estas ĉefe pri la kreado de rimodoj por efektiviĝi tiujn aferojn. Tiel, ni povas kongregi kaj kunigi la klopodojn por pli bone agi. Tial ekzistas naciaj organizoj tiel kiel Brazila Esperantista Junulara Organizo. Mi volas danki kelkajn specialajn geesperantistojn - la tre konatajn Emilio Cid kaj Marija Pozder Almada - kiuj min helpis en la e-vojo kaj ĉiam kredis je la fakto ke mi povas "piediri per miaj propraj kruroj"; al la pasintaj estraranoj Isis Okabe Piton, Rogener Pavinski kaj Rodrigo de Méo; kaj ankaŭ al la batalemaj Roger Gotardi (el Curitiba-PR) kaj Ricardo Almeida (el Campinas-SP), miaj unuaj konataj esperantistoj (ankoraŭ pere de IRC Internet Relay Chat - interrete). Mi esperas de vi, kore, sinceran bondezirojn kaj apogon.

Dankege
 Felipe Queiroz



NKD!

26^a BEJK



Post ĉiuj kongresoj, mi kutime verkas raportojn pri ili. Ordinare per ili, eblas scii la okazintaĵojn de la kongreso laŭ amuza kaj persona vidpunkto. Ĉi-foje mi taskigis aliajn homojn por tion fari kaj la rezulto estas ke vi tute ne scios pri kongreso legante iliajn raportojn. Mi ne scias ĉu estis kompleto kontraŭ mi aŭ ĉu mi ne kompetentas por komisiu aliulojn. Ili (nome

Rafael Lins kaj Raoni Souza) decidis nur rakonti pri siaj propraj turaj kaj NKD-aj (nekredeblaj) spertoj dumkongresaj. Eĉ la nova prezidanto de BEJO “eniris la ondon” kaj decidis moki sin mem! Almenaŭ mi lernis ion: Se vi volas fari ion bonan, ne komisiu sed faru vi mem. Kaj se vi volas ion NKD-an, komisiu fuŝulojn kiel ili. :)

Rogener Pavinski

NKD!

26^a BEJK

Unua leciono - Felipe Queiroz

Do, kiel eble vi scias, en ĉi tiu BEJK oni interalie elektis novan estraron por BEJO. Ĉar la movado de mia nuntempa loĝurbo, Florianópolis, estas tre malgranda, tial en ĉi tiu semestro mi kunigis miajn strebojn precipe por la loka movado kaj iomete lasis BEJO-n, eĉ pro la tiama neekzistanta interreta aliro en mia eksa studenta domo (jes, kredu, ankaŭ mi loĝis en tia loĝejo). Ni, jam dumkongrese, bone pridiskutis la direkton de la junulara e-movado, kelkaj ideoj aperis, duboj estis solvitaj kaj aliaj tuj naskiĝis, kiel sekvo de nia evoluado.

Tamen, kiuj partoprenos la novan estraron? Jen dubo! “Sed hodiaŭ estas la tago de la elekto!!!” Ne, la afero ne estis tiel simpla, ne estis grupoj por konkuri al estrarano, eĉ ne unu grupo por preni la taskon, do ni bezonis krei ĝin tujuje! Tamen, ĉar neniu volis esti la prezidanto, mi, la plej erara, la plej malkuraĝa, kaj finfine, unu el la plej fuŝaj esperantistoj el la tuta Brazilo, sentis aferon ene de mi kaj diris memorindan frazon, pli-malpli tiel: “Bone, fakte neniu volas esti la prezidanto... Do, eble mi bedaŭros poste, sed mi volas diri, ke se ĉiuj vi konsentos, oni forviŝos mian nomon de la fiska konsilantaro kaj metu ĝin en la prezidantecon”.

Ĝeneralaj krioj! Aplauĉoj! Kaj tuj poste, ĝeneralaj moko. Multaj traktis min ŝerce, kiel tiujn kandidatojn de filmoj kaj brazilaj dramserioj - “Tiu estas nia prezidantoo!! Viva nia prezidanto!!!” do mi bezonis elteni... Do, la junularo, post tiu serioza kaj kompreneble bezonata kongresa etoso, iris al la studenta nomo karese nomita “Kurba Domo” ŝerce al nia pola amikino, kaj alia festo stariĝis. Muzikaĵoj esperantaj, babiladoj, ridadoj, multaj “Jes, ĉefo! Ĉu vi volas alian bieron, ĉefo?” malprobataj de mi, k.t.p. Aĥ, pri la bieroj... Pro ili mi festumis, ĝuis la etoson, kaj eĉ kverletis kun konservativa studentino pri lingvistiko de UNICAMP, amikino de Lucas, neesperantistino, pli ebria ol mi, pri la internacia lingvo... Poste, mi provis imiti la brazilan prezidanton*, dirante ke mi kreas kvotojn al e-programoj...

Tamen, mi neniam emis krei skandalon nek furoron pro la drinkado, do mi simple sidiĝis iuloke kaj dormis, kaj nur vekigis pro krio de iu en la mateno, en la ĝusta horo por iri kongresejen kaj spekti la kongres-fermon. Spekti? Ho veeeeeee! Mi tute forgesis ke la nova prezidanto devas esti antaŭ la tablo por plenumi la formalizaĵojn, kaj la nova prezidanto ekde tiam estis mi! Do, oni min vokis, kaj mi iris al la podio... Ĉiuj gejunuloj bone kaj ŝerce min aplaŭdis, aliaj pli serioze... Mi emociiĝis kiam mi vidis sinjorinojn, kiujn mi konis en la Kongreso de Maceió-AL, rekonante min kaj eĉ iomete plorante, dum aliaj ŝerce kaj moke kriis “Hoooo, beluuulooooo”. Malgraŭ mia timemo, ĉio okazis komforte kaj ĝoje... Tamen, la kongreso finiĝis, kaj estis tempo por adiaŭi la geamikojn. Post tio, aliaj ploradis kaj min plorigadis.

* <http://www.youtube.com/watch?v=kTjkuSapGIA>

KIEL FARIĜI PREZIDANTO DE JUNULARA ORGANIZO

KIEL FARIĜI PREZIDANTO DE JUNULARA ORGANIZO

Dua leciono - Rafael Lins

Estis festo kiel ordinare en la kurba domo. Post multe bruumi muzike, Roĝener kaj Roĝer sidiĝis apud mi kaj Jimes, kaj komencis babili kiom gaje estas renkontiĝi, memori per bedaŭroj pri tiuj kiuj ne venis, rememori la pasintajn kongresojn ktp. Post iom da tempo, la babilado trafis la temon de ĉi-jara BEJO-sembleo, en kiu estus elektita la nova estraro. Ektimante la manko de kandidatoj, ni despere ŝercis kun ĉiuj en la festo: "hej, vi, gratulegon!! VI ESTIS ELEKTITA LA NOVA PREZIDANTO DE BEJO!!! ĈIUJ HURU!" HUUUUUUURAA oni laŭte kriis. Tiam, preterpasis Felipe, jam iomete ebria kaj, kaptita de la kriegoj, alvenis por vidi kio okazis. Kun li ni faris la saman mokaĵon, kaj li reagis ŝerce emociiĝinta, gapiĝinta kaj helikparole, kiel ordinare: "Ho! Ne!! Vi ŝercas!! Mi?! Ĝuste mi?! Mi ne tion meritas, dankon, dankon".

La sekvantan tagon okazis la asembleo. Ĉiuj serioze konsternitaj pro tio, ke mankis kandidatoj al la postenoj de la Organizo, iom post iom oni anoncis sian nomon al la oficoj, ekde la plej subaj ĝis la dua

plej granda, sekretario. Nu, mankis ke iu sin kandidatu al prezidanteco! Kiu sin anoncas?, kiu sin anoncas? Ĉiuj silentas kaj rigardas anxie unu la alian, atendante ian surprizon. Subite Felipe levas sian voĉon (kiel cetere fluas tiom rapide kiom geologia tempomezuro): "Nu, se ĉiuj tiel deziras, bonvolu forviŝi mian nomon el la fiska konsilantaro, kaj mia ja akceptas la postenon de prezidanteco!", li fiere kaj brustoplene elparolis la lastajn vortojn. Tuj mi malfermegis miajn okulojn kaj ekpanike rigardis lin, celante krii: "neeeeeeeeeee, kara, neeeeeeeeeee! la hieraŭa invito estis nur ŝerco, nenio pli ol tio! ŝerco! ŝ-e-r-c-o!!!". Sed mi tuj memoris ke BEJO ja bezonas laŭstatute prezidanton kiu ajn li/ŝi estu, kaj se mi sciigus la mokaĵon, oni eĉ volus puni min devigante mian akcepton al prezidanteco.

Do, prefereble ni ĉiuj vivu kun la iluzio, ke la elekto de Felipe okazis sub bonveniga kaj ĝenerala akklamo de la asembleo. Nu, tiel mi spektis tiun historion. Aliaj versioj bonvenas.....



FOTO: Junularo dum BEJK

NKD!

26^a BEJK

LAPRAŬ: nova prepozicio kreita dum ĉi tiu BEJK, signifanta "ĉirkaŭ" kiam temas pri hor-indiko: esperante: la festo komenciĝos lapraŭ la sepa horo. portugale: a festa vai começar lá pras sete horas.

N.K.D.: interjekcio kiu furoris inter la junularo, konstante ripetata en pluraj kunteksto. Ĝi estas NeKreDeble taŭga por esprimi eksurprizon, maltrankvilon, malplaĉon, tristecon...

ĈEMIZOJ: maniero kiun firuza junulo trovis por nutri siajn plej aĉajn emojn: drinkan, orgian, fuman, drogan. Ilin vendanta kune kun papera klariga helpopeto - por ŝajniĝi sin honesta - tiu fripono povis kolekti monon kiu ebligis la okazigon de la babilonecaj festoj en La Kurba Domo.

KOMUNA FI*EJO: nova politiko por plinombrigo de eistoj per postnaŭmonata naskiĝo de denaskuloj. La intenco ja estis bona kaj eĉ funkciebla, se la viruso de dececo ne tiom svarmus inter la gejunuloj. Ŝajne esperanto ankoraŭ ne fariĝis taŭga seksperanto.

LA KURBA DOMO: la loko kien kondukis ĉiuj vojoj post la fino de tagaj programoj de la kongreso. Tie okazis la festoj, drinkadoj, kaj aliaj aferoj ne menciindaj. Pri ĝia nomo, serĉu pri "kurva" en polaj vortaroj.

ĈIPA: serĉu pri "cipa" en polaj vortaroj. Kelkaj eĉ diras ke "kurbulinoj pli ĉipas en pollando".

EVOLUO: Eco propra de iu argentindevena muzikstilo, sed kelkfoje ŝajne ne de esperanto-movado. El la ronkiga Solena Malfermo - en kiu paroladis 30-minute eĉ la vicsekretario de la subsindikato de la laboristoj de la nenifaranta sekcio de la Ministerio pri Laboro - rimarkindas la prezentiĝo de tri argentinanoj kiu ridigis la tutan spektantaron. Neeblas kalkuli kiom da malesperantistoj oni sukcesis post tiuj okazaĵoj. Sed ve, negravas: la tango evoluas....

NIGRA TRUO: laŭvortare, Supernovao estas "stelo kiu brilegas per siaj eksplodadoj". En esperantujo ĝi ankaŭ povas alude signifi ĵus debutiĝintan rokgrupon kies nomo oni tuj devis ŝanĝi, postulante de la e-istaro sugestojn por nova nomiĝo. La sugesto kiu aperis dum ĉi tiu kongreso, kaj kiun tiu ĉi humila raportanto apogas, estas "Nigra Truo", kiu laŭdire estas la plej logika sinsekvo al Supernovao.

ĈIELO: ke la suno naskiĝas je l'oriento, tio ja ne estas novaĵo. Sed kiu diras ke ankaŭ la Ĉielo havas preskaŭfermitajn okulojn, estas amuzulo kaj nk-d-e, eĉ parolas esperanton...

KONGRESA BALO: kion??

Glos ar eto



no congresso brasileiro de esperanto

Primeiramente eu peço perdão por minhas frases simples, que usarei para escrever essa memória sobre a minha participação no Congresso em Campinas. O meu conhecimento lingüístico insuficiente não me permite escrever e falar em esperanto de acordo com meu exato modo de pensar... mas como eu notei durante o Congresso, isso não tem nenhuma importância no mundo do esperanto, porque não é a língua, e sim o coração e a vontade, a base para começar novas relações com outras pessoas.

Desde alguns dos últimos anos eu tenho a possibilidade de viajar e trabalhar fora de minha amada pátria Polônia, mas eu nunca defino a mim mesma como uma viajante, porque na minha opinião não é possível como viajante conhecer suficientemente bem a cultura e o modo de pensar de pessoas de outros países. Por isso eu decidi durante alguns anos trabalhar fora da Polônia para conhecer pelo menos um pouco outros países com seus habitantes e o meu objetivo é sempre conhecer mais a humanidade...

Infelizmente eu me tornei esperantista apenas há um ano e três meses e agora eu notei que, se eu tivesse conhecido o esperanto antes, minhas experiências fora de meu país certamente seriam muito, muito ricas, cheias de inesquecíveis relações com pessoas de diferentes culturas. Mas não vale a pena lamentar, e sim agora adentrar mais o mundo do esperanto...

Há onze meses eu tive apenas duas experiências com o esperanto durante as quais eu pude falar esperanto um pouquinho e conhecer esperantistas de outros países da Europa.



Inés (Agnieszka) Machota - Polônia

Eu participei de um pequeno encontro em Zutendaal (Holanda e Bélgica) e de um dia aberto na Associação Universal de Esperanto em Roterdã. Mas estas ações não me motivaram a ser uma esperantista mais ativa como este congresso em Campinas. A razão deste acontecimento eu pretendo esclarecer agora...

Então, quando eu decidi vir para participar do Congresso em Campinas, eu comecei a ficar um pouco com medo. Eu não tinha certeza se poderia me comunicar suficientemente bem com os participantes em esperanto e se poderia me encontrar entre os brasileiros, porque eu sabia pouco sobre os habitantes do Brasil. Meus amigos sempre me dizem que eu viajo tanto que certamente é muito fácil pra mim conhecer estrangeiros.

Mas não. Sempre o conhecimento de pessoas de outras culturas é uma nova experiência... Eu notei que a vida de pessoas em países diferentes é sempre diferente, modo de pensar e conduta diversas mas sempre há algo igual: A necessidade de estar entre amigos, a necessidade de formar relações com outras pessoas para não ficar sozinho. O esperanto dá esta possibilidade importante e básica...

Então, alguns fazem isso mais facilmente, outros menos facilmente. Alguns precisam, por exemplo, das festas para começar a conversar, beber, para deixar o medo; outros quebram barreiras tocando um instrumento, outros deixam o medo pela dança e pelo canto, conversam e ainda para alguns basta apenas estar ao lado, olhar, escutar os outros e assim por diante... Isto depende da cultura e da capacidade própria a pessoa. O que aconteceu durante o Congresso?

Bem, primeiramente eu notei uma simplicidade para mim inacreditável para começar a conversar com pessoas desconhecidas, o que os brasileiros eram em geral. Eles são um pouco parecidos aos

faltam informações sobre a pátria de Zamenhof. Durante o Congresso, eu recebi um convite do Congressinho Infantil para vir aqui e contar uma historinha sobre a amizade em esperanto. Eu comecei o meu encontro com crianças esperantistas com perguntas relacionadas à Polônia. Eu me surpreendi muito, pois eles sabiam algumas informações sobre a pátria de Zamenhof... Isso realmente surpreendeu e me deixou contente...

Então, a conclusão geral da minha experiência como participante do Congresso Brasileiro de Esperanto é o fato de que o movimento esperantista entre os brasileiros é completamente vivo, afável e aberto para todos, até para esperantistas estrangeiros. Mas isso não é tudo eu passei muito tempo durante o Congresso entre esperantistas jovens e eu posso sem dúvida dizer que o esperanto continuará no Brasil graças a eles, porque não é para eles apenas uma língua mas uma constante espontânea parte de suas vidas cotidianas... eles „infectam” os não-esperantistas com o esperanto... isso pode ser possível apenas quando o esperanto está dentro deles mesmos...

“O ESPERANTO É PARTE DE SUAS VIDAS COTIDIANAS”

habitantes do sul da Europa. Por exemplo, os poloneses precisam de mais tempo para conhecer e se abrir a uma pessoa recém-conhecida.

Em segundo lugar, o calor que os brasileiros têm neles mesmos é inimitável, mas este calor e amor que eles têm por outras pessoas é bem espontâneo, bem simples, tranquilo e não tem nada de hipocrisia... Eu fico feliz pelo fato que grande parte do movimento esperantista do mundo consista de esperantistas brasileiros, pois isso significa para mim que o esperanto terá um bom e belo futuro. Este Congresso foi para mim o primeiro mas eu já sei que para sempre ele será o mais inesquecível e cheio de caras lembranças.

Eu notei também a grande curiosidade que os esperantistas brasileiros têm sobre a Polônia, sobre a cultura e a língua da minha pátria. Alguns já sabem o bastante sobre a Polônia porque, por exemplo, eles tiveram a possibilidade de visitá-la ou se correspondem com poloneses, mas em geral

Para mim, como polonesa, apenas uma característica dos brasileiros é incompreensível entre aqueles que eu conheci e notei durante o Congresso: Por que as pessoas se despedem durante

tanto tempo? Para esclarecer isso, eu dou um exemplo: na Polônia, quando acaba uma festa e as pessoas se levantam para sair do local, elas dizem “Cześć”, “Do widzenia” (até a próxima!) e logo saem. No Brasil, NÃO!!! Elas precisam de uma hora para se despedirem umas das outras... Incrível!

Então esta pode ser a razão pela qual depois de minha estadia de dez dias no Brasil foi tão difícil me despedir dos esperantistas brasileiros, meus novos e inesquecíveis amigos... Por que as pessoas não disseram pra mim como eu posso voltar e novamente começar o meu trabalho na Argentina depois deste congresso cheio de amizade e alegria? Eu agradeço de coração a todos os participantes do Congresso pelo coração que deram a mim e eu digo a vocês: até a próxima!



pelelo esperanto na Europa

Esse ano a BEJO pela primeira vez realizou um concurso pioneiro, o concurso "BEJO-Ataŝeo 2006", Adido Cultural da BEJO na Europa, que tem um prêmio um tanto especial, sonho de todo esperantista, uma viagem de 3 meses a 1 ano para a Europa!

Surpreendente não? Bom foi exatamente uma mistura de surpresa e entusiasmo que Lucas Vignoli Reis, 23, o vencedor do concurso sentiu quando ficou sabendo do concurso. Para participar era necessário escrever uma monografia de 30 a 40 páginas sobre barreiras religiosas, diretamente em Esperanto, e além disso conseguir 5 adesões a BEJO.

Ele conta para a Momenton! como foi essa experiência:

Eu tenho um problema muito sério, eu me interesso por muitas coisas, e por muitas coisas bem diferentes entre si, física, filosofia, tipografia, antropologia, esperanto, e por aí vai... E calhou para a minha sorte que o tema do ensaio reunia quatro coisas que sempre quis estudar mais a fundo, religião, sociologia, antropologia e Esperanto, e além disso apresentava um dos desafios de que eu mais gosto: conciliar as coisas.

Fiquei sabendo do concurso através de uma mensagem da lista da BEJO encaminhada pelo Jimes para a lista de discussão aqui do nosso grupo da Unicamp. No dia seguinte minha vida já tinha mudado completamente, passei a quase não pensar em outra coisa, senão na monografia. Comecei a estudar muito Esperanto, e já comecei a ter idéias para a monografia, porém dessas idéias do começo pouca coisa ficou. Mas elas foram muito importantes para manter a intensa reflexão sobre o assunto na minha cabeça.

Nesse interím me veio uma idéia, que me foi muito valiosa, a de fazer uma pesquisa de opinião sobre o assunto entre os esperantistas mundo afora, justamente aproveitando essa característica maravilhosa do Esperanto de permitir uma troca transcultural muito mais direta, intensa e justa.



Lucas Vignoli Reis

E realmente tenho só o que agradecer a comunidade esperantista, obtive respostas dos lugares mais distantes do mundo, inclusive de Israel, do Irã, da Indonésia, dos Estados Unidos e do Japão, o que me ofereceu um espectro muito amplo de opiniões e de fundos culturais, o que me guiou bastante na escrita da monografia.

Obtive ajuda também dos meus queridos amigos antropólogos, da Luana, do Xuxa, da Mayra e da Lu, com quem tive as mais férteis discussões, e os quais muitas vezes me derrubavam algumas idéias imaturas que eu ainda tinha na cabeça. Queria fazer um texto que fosse bom mesmo lido por alguém do ramo. Fui até onde consegui. Gosto bastante do resultado final, especialmente no que se refere ao conteúdo. Quanto ao Esperanto, não me orgulho tanto do estilo, ainda tenho muito o que melhorar no meu estilo de escrever em Esperanto, mas para uma primeira experiência de longa escrita (acho que nunca escrevi tanto nem em português) valeu, aprendi muito. Quando fiz a revisão final era 10 da manhã do dia 16 de junho, sexta-feira, penúltimo dia do prazo de entrega, e eu tinha varado a noite.


E agora vem a melhor parte, aproveitar o prêmio. Além do Esperanto, aprendo italiano já há um ano, e pretendo ficar esses seis meses na casa de um amigo esperantista, Max Tulliach, que mora num vilarejo de Ancona na Itália, chamado Cupramontana. Já nos correspondemos há dois anos, com certeza vai ser emocionante nosso encontro, e vai ser uma experiência única. Max mora numa casa sem eletricidade e ele tem o costume de tomar banho no rio, espero conseguir acompanhar essa rotina. A casa dele, se ele deixar é lógico, será minha base, de lá farei curtas viagens de ida e volta para várias cidades da Itália usando o pasporta servo, e fazendo as palestras que devo fazer, sobre a cultura do Brasil e sobre meu próprio trabalho também. Além dessas pequenas viagens na Itália, pretendo conhecer pelo menos a Polônia, a França e a Espanha em viagens um pouquinho mais longas, nas quais também farei minhas palestras. Espero fazer um belo diário de

viagens, repleto de belas fotos, e espero representar bem a BEJO lá fora.

Resolvi ficar mais tempo num lugar, porque quero ao menos conhecer mais a fundo, entrar em contato mais próximo com uma cultura. Bom na verdade duas culturas, a cultura da Itália e uma cultura mais abrangente e mais internacional a cultura do Esperanto, aprendendo bastante Italiano e Esperanto nesse caminho! Com certeza será muito enriquecedora essa viagem, e aguardo-a com uma certa ansiedade.

Muito obrigado a todos amigos esperantistas que mantêm essa comunidade acolhedora.

<http://www.esperanto.org.br/bejo/vikio/>



BEJO VIKIO

BEJO-VIKIO ESTAS LA SEKCIO DE LA PAĜARO DE BEJO, KIUN LA MEMBROJ POVAS REDAKTI LA ŬVOLE



NKD!**26^a BEJK****La plej terura nokto el mia tuta vivo**

Aŭ kial ne fidi je blondharaj surfistaj karioknoj - Rafael Lins

Ĉio pasis amuze tiutage. Mi eliris la kurban domon feliĉa pro la varma, alloga vetero. Tiom da tagoj for el mia ĉiamsomera urbo, la malvarmo de Campinas terurigis min pli kaj pli. Por ĝui la eksterordinaran veteron de tiu tago, mi vestis min per pantaloneto, senmanika ĉemizo, kaj sandalo. Kredinte, ke tuj post la prezentado de Jomo mi revenus al mia gastejo, mi tute ne timis la malvarmon de la vespero. Post la muzika prezentado, ĉiuj ni iris al drinkejo en la centro de la urbo. Amuzis la babilado, svarmis ridoj, fotoj, kiel kutime. Jam ektimigis min tio, ke Lucas ne plu troviĝis tie por veturigi min al la kurba domo (kiu troviĝis centkilometrojn for de la kongresejo, aŭ eĉ pli depende de kiom rapide mi devus senpacience trafi ĝin), kaj je tiu horo verŝajne jam ne eblis plu preni buson. Tion avertante al la kunuloj, Rozinjo tuj invitis min dormi en la Komuna Loĝejo de BEJO tiunokte kaj, ĉar mi ne kunportis la dormosakon, ŝi pruntedonus al mi aldonan littukon kiun ŝi kunportis. Tute trankviliĝinte, kaj ekfrostiĝante (jam estis noktomezo) mi ree ĝuis la etoson. Alveninte al la KL, ni daŭre amuziĝis per ludoj, ŝercoj, babiladoj. Nur je la 2a ni decidis entliĝi (kvazaŭ tie troviĝus litoj). Kiam mi petis al la kariokino pri la littuko, ŝi, serĉante en sia valizo, malkovris ke ne aldonan littukon ŝi havis, sed kusen-kovrilon!! Komenciĝis tiam miaj suferadoj...

Kiu gastis en la KL bone scias pri kio mi parolas. La loko estis kungua ĉambrego, kun nenia ŝirmo kontraŭ malvarmo. FROSTIGEGA!!! Serĉante vakan lokon por dormi, mi nur trovis sur la tatamoj premigan lokon inter Raoni kaj Emerson. Tie kuŝanta, mi ne sukcesis dormi. Evidente ne! Rigardante la ĉirkaŭon mi vidis feliĉajn dormantojn kiuj vestis ĉemizojn, jakojn, gantojn, kufojn (kaj ĉiajn vestaĵojn por malvarmo kiajn mi kapablis fantazii dum frostdeliraj miraĝoj), k krome ŝirmataj de dikaj littukoj!! Kiom maljusta estas la mondo, mi ade plendis al mi mem. Por uzi kiel kusenon, mi ŝtelis vestaĵmonteton de Raoni dum li dormis kiel anĝeleto, kaj la kusenkovrilon de Rozinjo mi ja uzis por ŝirmeti miajn piedojn (pli bone ol nenio). Terurigaj horoj en fridujo... Dekomence mi malbenis min pro tia stultajo: kial iri al drinkejo drinkumi kun fidrinkemuloj, dum varmiga, komforta dormosako atendis min en la Kurba Domo? Poste mi malbenis Jimes, la respondeculo pri la loĝejo: el ĉiuj ĉambregoj proksimaj de la kongresejo, kial li devus elekti ĝuste tiujn fridujan kunguan ĉambregon???? Finfine mi elektis la celon de miaj malbenoj: ROZINJO!, kaj mi pasis la ceteron de la nokto (evidente mi nur endormiĝis dum la ekmateniĝo, kiam la malvarmo ekdispistiĝis) sendante malbenajn sorĉojn al la blondulino. Almenaŭ ŝi povas disprifajfi, ke mi iam pasis tutan nokton pensante pri ŝi...

La plej deprima vekiĝo de mia vivo

Raoni Sousa

Noto: ĉar estis sufiĉe multe da homoj en la kongreso, certe ĉi rakonto publikiĝos sen tio, ke la plejmulto de la legantoj ekscios, pri kiuj temas...

Jen estis nokto sabata, kaj ĉiuj BEJO-loĝejanoj estis revenintaj de la malfermo de la kongreso. Amuzetis la etoso; homoj el diversaj lokoj libere babilis kaj ridadis sprite dum pretigado de siaj litoj. Ĉio glatis, ĝis tiam, kiam maljunulino laŭtlevis sian voĉon kaj petis silenton taŭgan por dormado. Nu, ĉar mi mem ne ŝatas dormi je bruado, tial mi kuŝiĝis kaj dediĉis mian tempon al legado. Ĉio tiam glatus, se la maljunulino ne malŝaltus la lampojn! Ho, ve... Sed ĉar mi ankaŭ ne ŝatus lumon antaŭ ekdormo se mi estus tiel flore sentikapabla, tial mi silentis kaj strebis profiti dum kelkaj minutoj la eksteran lumon, kiu trairis la vitrofenestrojn. Post kelkaj minutoj mi rezignis kaj ekklopodis dormi (malgraŭ tiom da inferronka bruoj). Post multaj duonhoroj da enuo, korpostreĉado kaj merdopensado, mi ekdormis. [Songoj cenzuritaj] Dormado TUTGLATUS, se tre frue dimanĉe matene tiu sama maljunulino ne estus vekiĝinta, ĉirkaŭbruinta kaj tumulte ĉirpinta dum sia fia pretiĝprocedo por la kongrestago! ĤĤĤĤ!! NU, ĉar se mi estus MALJUNULO en JUNULARA LOĜEJO, mi TRE ZORGE PRIPENSUS MIAJN AGOJN, mi... mi bezonis longan strebadon por pardoni ŝin en mia menso mem. (Fakte, mi ankoraŭ ne sufiĉe strebis.)

Jen pasis la tago! (Rimarkindas, inter aliaj, la matena allogaĵo: diskuto kun fatalista gotikulo pri anarkiismo! Nek kredeble, nek priskribeble amuze...) Tutglata tago, kun muzikado de JoMo nokte! Vivu! Sed, ĉar mi povas senti la Bonan Etoson® sed ne sukcesas bone kapti ĝin, kiam ĝi manifestiĝas je dancado, tial mi ĉeestis la muzikadon nur dum kelkaj minutoj kaj poste eliris halen por neniumi, vagifajfi kaj perdiĝi en pensoj. Sed jen en la halo alproksimiĝis ĝis tiam nekonata juna samloĝejanino. Laŭnature ni ekbabilis, kiu estas via nomo, kie vi loĝas, kiam vi lernis Esperanton, ĉu vi laboras, ĉu vi studas, ... "ĉu vi bone dormis?", ŝi demandis. Aŭtomate mi respondis. Ho, jes, ĉio estus perfekta, se la sama majunulino, kiu plendis pri bruo nokte, ne estus brudadinta matene... Ha, mi komprenas... Post tio, la babilo misterakiale malvigliĝis. Pasis kelkaj minutoj, kaj jen ial alproksimiĝis la majunulino de la loĝejo... Kaj la junulino alvokis ŝin, "patrino!"

Ho, ve... nkd...

NKD!

(Aŭ "kial majunulinoj ne devas enloĝi en BEJO-loĝejon", aŭ "kial ne plendi pri iu nesciante pri kiu plendiĝas" aŭ "la teorio de Georg Simmel pri la moderna mondo praktite kontrolebla en Esperanto-kongreso!")



JoMo (t.e. Jean-Marc LECLERCQ) estas franca kantisto. Li iam estis kantisto de la grupo Les Rosemary's Babies (La Rozmariaj Beboj) kiu eldonis du KDojn ĉe la franca diskeldonisto Boucherie et Willins Production. Per Esperanto li muzikumas jam de 15 jaroj. Li lanĉis jam 3 diskojn tute en Esperanto kaj partoprenis en aliaj kompilaĵoj. Li venis la unuan fojon al Brazilo por koncerti dum la 42-a Brazilia Kongreso de Esperanto.

JoMo

Kial, kiam kaj kiel vi lernis Esperanton?
Mi esperantiĝis la 3-an de oktobro de 1988. Precize, ĉu? Estis mia unua kurso. Delonge mi interesiĝis pri lingvoj, aŭdis pri Esperanto kaj pensis, ke iam mi ĝin lernos por "koni unu lingvon pli" kaj ankaŭ pro la mesaĝo pri internacieco, kiun ĝi kunportas. Mia renkontiĝo kun Floreal Martorell rapidigis la aferon. Dank'al li, mi malkovris la movadon kaj la eblecon ekkoni novajn amikojn en la tuta mondo.

Kial muziki esperante?
Fakte, mi estas muzikisto antaŭ ol esti esperantisto, pli precize mi koncertis la unuan fojon en 1978 kaj esperantiĝis en 1988. Mi komencis tute nature muzikumi esperante samtempe ol lerni la lingvon. Mi bone memoras, ke la vorto "hejmen" sonis al mi kiel la angla "hey, man" kaj ŝajnis sufiĉe rokenrole. La unua kanto, kiun mi komponis kaj verkis en esperanto nomiĝas do "Hejmen". Mi neniam ludis ĝin sur scenejo nek surbendigis. Mi pensas, ke ĝi estas sufiĉe fuŝa.

Ĝenerale mi koncertas multlingve por esperanta aŭ neesperanta publiko. Por mi estas bona ebleco prezenti la lingvon internacian al "krokodiloj" per maloficiala kaj distra maniero. Mi ne rakontas tro profunde pri kio temas, sed almenaŭ la homoj aŭdas la nomon, vidas ke ĝi ekzistas kaj aŭdas ke oni povas kanti per ĝi. Koncerto ne estas taŭga momento por doni kurson pri lingvistiko, do almenaŭ homoj aŭdas pri ĝi.

Dum Esperantaj koncertoj, mi ĝenerale kantas en pli ol dek lingvoj; mi estas tro mallaborema por povi kalkuli precize kiom da. Estas tri specoj de kantoj: kelkajn mi konas en du versioj: esperanta kaj krokodila. Mi kantas ilin esperante dum renkontiĝoj. Kelkaj havas nur esperantan tekston kaj aliaj nur malesperantan. Tiuj neniam ŝanĝiĝas. Mi povas aldoni kvaran specon: la kanzonoj kies tekstojn mi forgesas sur la scenejo!

Kiel estis via unua koncerto en Esperanto?

Mia unua koncerto en Esperanto estis dum IJoKo 1989 (!) en urbo Kerkrade en Nederlando. Mi ankoraŭ malmulte sciis la lingvon, sed tute ne gravis, la rezulto estis amuza por la spektantoj (mi esperas). Mi ofte eraris ("Saluton karaj geamikoj kaj geamikinoj!") sed parte ankaŭ volonte. Mi demandis konsilojn de traduko el la scenejo al Aline Boulet, kiu tiam estis prezidantino de Junaj Esperantistaro de Francio kaj sidis je la unua vico de la publiko. Mia vestaĵo estis tiu de mia rokbanda "Rozmariaj Beboj", tio signifas, ke mi vestis kiel juna lernejo de la jaroj 1940, kun bereto(?) sur la kapo, mallongaj pantalonoj kaj enormaj ŝuoj. La anekdoto plej notinda estas, ke dekstre en la publiko staris bela juna Polino (pleonasmio), kiu poste iĝis mia edzino. Ni ambaŭ bone kaj emocie memoras tiun momenton, kompreneble.

Ĉu vi havas amuzajn spertojn rilate al Esperanto?

Neniam amuzan anekdoton, sed kelkajn malkutimaĵojn, kiel ekzemple, vizito en tiama Ĉekoslovakio de la loka esperanta klubo, kun nur bildoj de Lenino kaj Markso kaj ruĝaj steloj sur la muroj (nenio verda), gvidataj de la prezidantino de la klubo kiu... ne sciis unu esperantan vorton.

Alia vizito de loka klubo en Aŭstrio dum kurso, kie lernantoj studis hazarde tekston de kanzono... de JoMo!

Dum nia kurso en Tuluzo, mi memoras, ke ni uzis tre ofte la vorton "petu" (responde al "mi petas"), ĉar tio signifas en nia okcitana lingvo "furzeto".

Dum mia unua IJoKo, mi hazarde sidis je tagmanĝo antaŭ Kim, la muzikisto el Danio, kiun tiam mi ne konis. Li estas konata pro speciala prononco de Esperanto, rapida ĉar li estas "denaska". Li parolis al mi, mi estis komencanto, kaj nenion komprenis. Mi pensis "Kial diable li parolas al mi dane?".

Dum KEF 2005 en Helsinko, mi iris buse al flughaveno por atendi nian drumiston, kiu alvensi aviadile. Atendante la revenbuson, en la vico antaŭ ni staris junulo kun folio en la mano printita el interreto kun indikoj. Mi pensis, ke eble li estas esperantisto. Sed la problemo estis, ke nia drumisto ne estas, do mi ne povis paroli esperante por vidi, ĉu la alia persono reagos. Bonŝance, nia drumisto konas almenaŭ la vorton "amasloĝejo", kaj mi uzis tiun vorton en franca frazo, kaj la junulo turniĝis al ni. Estis Roger (Borges) de Brazilo.

Nuntempe ni havas komunan projekton pri verkado de muzikdisko.

Kiel estis por vi la Brazilia Kongreso en Campinas, SP?

Kongresoj estas ĉiam emociplenaj momentoj: malnovaj amikoj renkontiĝas, novajn amikojn vi ekkonas, ktp. En tiu senco, la kongreso de Kampino estis kiel kutime kaj mi revenis kun plena valizo da agrablaj travivaĵoj, eĉ se mi vidis nur parton de la aranĝo. Mi revidis amikojn, kiujn mi ekkonis en Finnlando antaŭ unu jaro (Roger, Rogener, Alejandro) kaj malkovris la brazilan movadon. La etoso estis bonega kaj la organizado pli bona ol tio, kiun oni povas atendi de latinida lando;-).

La renkontiĝo inter artistoj kaj publiko estis bonega kaj malkutima ideo. La salono kie okazis la koncerto kaj la sonsistemo uzebla estis sufiĉe bonkvalitaj ambaŭ. Por mi, kompreneble, tio tre gravas. Fojfoje la sono de la ejo fuŝas (ekzemple pro resonado de la muroj), sed en Kampino estis tute bone.

Pri la festoj, mi partoprenis unu iomete improvizan, dum kiu estis surmomenta bando de diversaj muzikistoj. Estis bonege kaj eĉ iam la etoso iĝis frenezuma kaj rokenrolega!

Tamen iomete surprizis min la spirita (ne nur spiritisma) etoso de la kongreso, kiu estas malpli kutima en Eŭropo, sed mi pensas, ke tio devas esti la spegulo de la brazila socio. Estis kelkaj eroj de programo pri religio kaj preĝado, kiuj estas por mi malkutimaj. Sed ankaŭ aliflanke en Brazilo mi malkovris, ke estas multaj liberecanoj. Bunta socio.

Lasta impresio: preskaŭ ĉiuj en Brazilo parolis pri futbalo al mi, kiu venas de okcitana lando de rugbeo (Tuluzo estis 16 fojojn ĉampiono de Francio kaj 3 fojojn de Eŭropo), kaj malbone konas pri piedpilkado.

Ĉu vi venis al la Brazilia kongreso en Rio de Janeiro, 2007?

Nenio ankoraŭ certas, sed mi ege ŝatus. Kiam vi komencas gustumi Brazilon, vi sentas emon plui kaj koni pli multe. Imagu, ke el tuta Sudameriko, mi konas nur Kampinon. Taŭgas vidi plu, ĉu ne? En la franca lingvo, estas diraĵo: mi havas en la buŝo guston de "reiru tien".

Futbala monpokalo 2

En la lasta numero de Momenton, oni prezentis retrorigardon super la futbalaj mondpokaloj, ekde la 1a, okazigita en Urugvajo, en 1930, ĝis la 9a, en Meksiko, en 1970, kiam la unuan fojon iu lando sukcesis konkerti sian trian titolon. La revuo, kiun vi nun havas enmane, proponas al vi historian fulmvojaĝon tra la futbalaj mondtuniroj de Germanio-1974 ĝis Japanio kaj Sud-Koreio-2002. Vi do scios, kiel Germanio venis al siaj 2a kaj 3a titoloj; Argentino al sia senprecedenca sukceso kaj poste al ties ripeto; Italio al sia 3a mondpokalo; Francio al sia 1a, finfine egaligante la faron de sia historia rivalo, Anglio; kaj ankaŭ pri la brazila konkero la 4an kaj la 5an fojojn. Do ek al la pilko!

GERMANIO 1974

Finalo: Germanio 2 x 1 Nederlando

Partoprenintaj landoj: Argentino, Aŭstralio, Brazilo, Bulgario, Ĉilio, Haitio, Italio, Jugoslavio, Kongolando, Nederlando, Okcidenta Germanio, Orienta Germanio, Pollando, Skotlando, Svedio kaj Urugvajo.

Oni revenis al Eŭropo por la Mondpokalo de 1974, en Germanio. Brazilo restis en la 4a loko kaj elstaris en la turniro Nederlando, kiu, eĉ tiel, en la finalo, ne rezistis al Germanio de Beckenbauer, malvenkante per 2 kontraŭ 1. Ja kurioza estis la malvenko de Okcidenta Germanio antaŭ Orienta Germanio, en Berlino, per 1 kontraŭ 0. Tia rezulto kreis neniun problemon al la kompanoj de Beckenbauer, kun kiuj restis la titolo.

La unuan Mondpokalon en Germanio karakterizis intensaj policaj protektooperacioj. La koncentroj de la 16 partoprenantaj landoj

kvazaŭ fariĝis superprotektitaj prizonoj, por eviti teroristan atakon, kiel estis okazinta du jarojn antaŭe en la Olimpaj Ludoj de Munkeno, kontraŭ la restadejo de israelaj atletoj. Felice, nenio okazis.

ARGENTINO 1978

Finalo: Argentino 3 x 1 Nederlando

Partoprenintaj landoj: Argentino, Aŭstralio, Brazilo, Francio, Hispanio, Hungario, Irano, Italio, Meksiko, Nederlando, Okcidenta Germanio, Peruo, Pollando, Skotlando, Svedio kaj Tunizio.

La Mondturniro revenas al Sud-Ameriko. Ĝi ne estis bona mondturniro. Brazilo malvenkis neniun matĉon kaj, nevenkite, restis en la 3a loko. La titolo iris al Argentino, kiu superis Nederlandon, en la pludaŭrigo, per 3 kontraŭ 1. Multaj ne trovis meriton ĉe la venkinto, tamen...

Argentino tiam vivis militistZan diktaturon kaj estus bone por la reĝimo havigi futbalan titolon. La popolo gajiĝus, kiel ja gajiĝis, sed la titolo ne havis brilon. Titolo estas valorigita laŭ la honesteco ĉe ties konkero. La granda polemiko de la konkurso estis la matĉo inter Argentino kaj Peruo, la duan fazon. La argentinanoj bezonis venki minimume per 4 kontraŭ 0 por transiri al la finalo kaj elimini Brazilon. La matĉo finiĝis je 6 kontraŭ 0 por Argentino kaj la suspektoj direktiĝis al la golulo de la perua selektitaro, Quiroga, denaska argentinano.

HISPANIO 1982

Finalo: Italio 3 x 1 Germanio

Partoprenintaj landoj:

Alĝerio, Anglio, Argentino, Aŭstralio, Belgio, Brazilo, Ĉeĥoslovakio, Ĉilio, Francio, Hispanio, Honduro, Hungario, Italio, Jugoslavio, Kamerunio, Kuvajto, Nord-Irlando, Nov-Zelando, Okcidenta Germanio, Peruo, Pollando, Salvadoro, Skotlando kaj Sovetunio.

La brazila selektitaro de 1982 rolas inter la plej bonaj selektitaroj el ĉiuj tempoj, sed ĝi pekis pro tio, ke ĝi ne respektis la senordan italan nacian teamon. La aspiratan gloron, ĝi kredis reala, antaŭ ol reale disvolviĝis la faktoj.

En Hispanio, jen bela kaj senkomplika turniro. La forta Brazilo estis eliminata de Italio, kiu venis nur de 3 remioj en la unua fazo. La italoj superis Germanion, en la finalo, per 3 kontraŭ 1.

La italoj havis tre multan fortunon, ke ili transpasis la unuan fazon. En la finalo, ili venkis super Germanio laca de matĉo drama, longa kaj decidita per punŝotado, kontraŭ Francio.

MEKSIKO 1986

Finalo: Argentino 3 x 2 Germanio

Partoprenintaj landoj: Alĝerio, Anglio, Argentino, Belgio, Brazilo, Bulgario, Danio, Francio, Hispanio, Hungario, Irako, Irlando, Italio, Kanado, Maroko, Meksiko, Okcidenta Germanio, Paragvajo, Pollando, Portugalio, Skotlando, Sovetunio, Sud-Koreio kaj Urugvajo.

Kvar jarojn poste, Kolombio ne povis organizi la Mondturniron kaj la respondecon surpris denove Meksiko. Argentino, de Maradona, brilis kaj superis Germanion, en la finalo, per 3 kontraŭ 2. Brazilo havis dramon kaj negativan vojiron pro Francio, en Gvadalaharo, malvenkante ĉe punŝotado. Brazilo tamen havis teamon kapablan havigi al si la titolon. En Meksiko, Argentino fariĝis ĉampiono la duan fojon. Du selektitaroj venis al la mondturniro kun la promeso disbati la kontraŭulojn: Hungario, kiu, ĉifoje, almenaŭ ne pereis proksime al la celo, ĉar ĝi estis eliminata en la unua fazo; kaj Danio, kromnomita Danmaŝino, kiu surpaŝis selektitarojn kiel la urugvajan en la unua fazo kaj poste estis eliminata per golaro, en la tujsekva fazo, de la furiozo hispania, kiu, cetere, venas al ĉiuj mondturniroj kiel la furiozo kaj la maksimumo, kiun ĝi sukcesis, tio estis kvara rango, en Brazilo 1950.

ITALIO 1990

Finalo: Germanio 1 x 0 Argentino

Partoprenintaj landoj: Anglio, Arabaj Emirlandoj, Argentino, Aŭstralio, Belgio, Brazilo, Ĉeĥoslovakio, Egiptio, Hispanio, Irlando, Italio, Jugoslavio, Kamerunio, Kolombio, Kostariko, Nederlando, Okcidenta Germanio, Rumanio, Skotlando, Sovetunio, Sud-Koreio, Svedio, Urugvajo kaj Usono.

En la finalo, Germanio venkis super Argentino, venĝante sin pro la malvenko en Meksiko. Brazilo malvenkis antaŭ Argentino, en la okonfinalo, per 1 kontraŭ 0, kvankam ĝi ludis pli bone, ol la argentinanoj. Maradona estas denove la stelulo, sed li ne estas sola, lia selektitaro ankoraŭ kalkulas je Canigia kaj la golulo Goicochea. Argentino eliminis Italion, ĉe la punŝotado, sed la germana futbalistaro, estrata de Lothar Matthäus (kiu ĉijare trejnigis la brazilan teamon Atlético Paranaense) estis pli forta kaj forportis la Pokalon, por la ĝojo de Franz Beckenbauer. Nun estas tri selektitaroj survoje al la senprecedenca kvara titolo.

Paralele al la ĉampionumo, okazis multaj kulturaj eventoj, en ĉiuj urboj, kun la celo prizorgi la milionojn da turistoj, kiuj vizitas la landon. Al Italio postrestis tre pozitiva saldo por ĝia sporto kaj por la estonto de ĝia turismo.

USONO 1994

Finalo: Brazilo 0 (3) x (2) 0 Italio

Partoprenintaj landoj: Argentino, Belgio, Bolivio, Brazilo, Bulgario, Germanio, Grekio, Hispanio, Irlando, Italio, Kamerunio, Kolombio, Maroko, Meksiko, Nederlando, Niĝerio, Norvegio, Rumanio, Rusio, Saŭd-Arabio, Sud-Koreio, Svedio, Svislando kaj Usono.

En la Mondpokalo de 1994, en Usono, la ĉeesto de la publiko, en ĉiuj matĉoj, faris el la turniro feston. Brazilo sukcesis, malgraŭ la pesimismaj prognozoj, gajni la titolon, post 24 jaroj. En la finalo, remio kun Italio kaj venko ĉe la punŝotoj. Romário estis la granda nomo de la brazila teamo.

La mondturniro estis furoro, evento escepte bone organizita, bone disvastigita kaj, super ĉio, akceptita laŭ korpo kaj animo de la enmigrintoj kaj de la usona popolo.

La kolombia selektitaro estis eliminata en la unua fazo de la konkurso, kio estis surprizo, ĉar ĝi estis bona kandidato al la titolo.

Maradona estis ekskludita de la Mondturniro pro uzado de stimuloj, kio malstabiligis la argentinan teamon, kiu ĝis tiam havis bonan staton en la konkurso.

FRANCIO 1998

Finalo: Francio 3 x 0 Brazilo

Partoprenintaj landoj: Anglio, Argentino, Aŭstrio, Belgio, Brazilo, Bulgario, Ĉilio, Danio, Francio, Germanio, Hispanio, Irano, Italio, Jamajko, Japanio, Jugoslavio, Kamerunio, Kolombio, Kroatio, Maroko, Meksiko, Nederlando, Niĝerio, Norvegio, Paragvajo, Rumanio, Saŭd-Arabio, Skotlando, Sud-Afriko, Sud-Koreio, Tunizio kaj Usono.

En Francio, en 1998, Brazilo alvenis plian fojon al la finalo, kiam ĝin superis Francio (3 kontraŭ 0), kun granda polemiko pri ne tre bone klarigita "malsano" de Ronaldo. Zidane estis la majstro de la ĉampiona teamo. Ĝenerale, la Mondpokalo estis bonega, unu el la plej bonaj el ĉiuj tempoj, kun grandaj matĉoj

kaj grandaj teamoj; futbalistoj tre lertaj.

La plej grandan surprizon protagonistis Kroatio, kiu havigis al si la trian rangon en sia unua Mondpokalo. Hispanio (La furiozo) elrevigis, pereinte en la unua fazo, kaj favoriginte Niĝerion kaj Paragvajon, kiuj elmontris, ke ili povus iri pli antaŭen.

JAPANIO kaj SUD-KOREIO 2002

Finalo: Brazilo 2 x 0 Germanio

Partoprenintaj landoj: Anglio, Argentino, Belgio, Brazilo, Ĉinio, Danio, Ekvadoro, Francio, Germanio, Hispanio, Irlando, Italio, Japanio, Kamerunio, Kostariko, Kroatio, Meksiko, Niĝerio, Paragvajo, Pollando, Portugalio, Rusio, Saŭd-Arabio, Senegalio, Slovenio, Sud-Afriko, Sud-Koreio, Svedio, Tunizio, Turkio, Urugvajo kaj Usono.

Partoprenonte en sia tria finalo sinsekva, en 2002, kaj montrante la forton de sia futbalo, Brazilo iris en Sud-Koreion kaj Japanion por brili. Teamo bone regita de Luiz Felipe Scolari venkis la finalon, en Jokohamo, en Japanio, super Germanio, per 2 kontraŭ 0, du goloj de Ronaldo.

Brazilo kaj Germanio neniam antaŭe alfrontis unu la alian en Mondpokaloj.

Ĝi estis granda turniro, publikoriĉa, kies matĉoj, ĉiuj interesovekis, ĉar la japanaj kaj koreaj gastigantoj progresis ĉe futbalo kaj eĉ luktis por elstara pozicio. Ĉe tio, Koreio pli bonis, ol Japanio.

Fontoj:

Mallonga historio de la 17 futbalaj mondturoj (portugallingva kajereto, kiu akompanas la rekomendindan DVDn FIFA Fever, kiu entenas filmerojn de ĉiuj futbalaj konkursoj organizitaj de FIFA)

Mondpokalujo, tre enhavoriĉa retpaĝaro, disponebla ankoraŭ nur en la portugala lingvo, de la brazila samideano Ricardo Dias Almeida <http://www.histcopas.muitacoisa.com/>

PEJZAĜO DE NORDORIENTO

Roberto Passos Nogueira

I

Ĉi tie la grundo sekas
Kiel lango de fihundo
Soife mortinta.

Trosomere

La arbedoj blankas
Tordiĝe, ŝparas foliojn.
Ostaj bovoj snufas
Kiel antaŭe kreskis saliko.
Sur la griza gruzo
Eĉ fiherboj mankas.

Verdas nur la dornaj kaktoj
Kiuj tenas intime l' akvon.

II

Ĉi tie la vivo akras
Kiel klingo de tranĉilo
Portita ĉe l' zono.

Trosomere

La kampuloj flavas
Tordiĝe, ŝparas parolojn.
Ostaj knaboj ludas
Kie antaŭe kreskis manioko.
En la pajla domaĉo
Eĉ fivermoj fastas.

Nur festas la grandaj bienoj
Kiuj l' akvon avare rezervis.

III

La kampulo el kakto trinkas
Por la bienisto eklaboras.

Trosomere

Nur bienoj floras.

Roberto Passos Nogueira, cearaano, estas ekstrarano kaj kunfondinto de BEJO. Li ĉefredaktoris la unuan oficialan organon de BEJO, la revuon Impulso, dum ĉirkaŭ dudek numeroj, inter 1967-72. En 1972 la eldonejo Stafeto eldonis lian libron 'Vojo kaj Vorto', kies antaŭparolon verkis la skoto William Auld. Tiu ĉi poezio troviĝas en la libro Esperanta Antologio, poezia kompilo far William Auld, eldonita de UEA en 1984. En tiu sama jaro, Marjorie Boulton en libro 'Ne nur leteroj de Plum-amikoj' tiel difinis la poeziojn de Nogueira: "originalajn poemojn laŭ tre eksperimentaj metodoj - ekzemple vortludoj, bizara kunmetaĵo de ideoj, rompita frazoj, ktp.".

William Auld

1924-2006

Rabista dormo


*Ha dormo, kiu al mi rabas
minutojn de la viv',
sur mia koramboso frapas
martelo de malammotiv',
ĉar miaj tagoj estas jam mallongaj
sen ankaŭ tio,
ke vi min lasas sen konscio
al porka stagno, al stuporoj ronkaj.*

*Mi, mi volas koni
ĉiun momenton de etern'.
Mi, mi volas spioni
plej etan spasmon de la homoverm',
penetri en komprenon ĝis la fundo,
kaj legi de l' epokoj ĉiun paĝon,
ne perdi mian junulaĝon
marasme kvazaŭ apudfajra hundo.*

*Esti poet' en mi sopiro ardas:
mi volas krei ja generi belon!
Sed ve, ho ve, mi nur rigardas,
ne vidas, ne traboras ŝelon,
ĝis la kerno, ĝis la kerno.
Mi scias, ke por poetiĝi
mi devas min dediĉi
al vivopleno da senfina lerno.*

*Tial, ho dorm' kruela, mi domaĝas
vian neforskueblan jugon.
Vin nur devige mi omaĝas,
klinas, klinas la nukon,
ĉar plonĝas mia kap' al la kuseno,
kaj miaj okuloj kreas,
valorajn horojn mi nevole devas
pasigi en senfrukta sveno.*

RABISTA DORMO, POEMO DE AULD, KIU
ESTIS MUZIKIGITA DE LA ENSEMBLO
KAJTO KAJ TROVIĜAS EN LA ALBUMO
"TOHUVABOHUO" AKIREBLA ĈE
WWW.VINILKOSMO.COM



Konkurso pri fabeloj

BEJO kaj la revuo Momenton! Invitas vin partopreni la unuan konkurson pri rakontoj. La temo estas "Internacia Amo". Rajtas partopreni en ĝi junuloj ĝis maksimume 35 jaroj. La rakonto, kiu ricevos la unuan premion estos publikigota en la aprila eldono de Momenton! Kaj ricevos R\$ 50,00 je libroj. La dua kaj tria premiitaj gajnos aliĝon al la 42^a BEK kaj 27^a BEJK en Rio de Janeiro 2007!

Internacia amo

Sendu ĝin ĝis la 15 de Januaro 2007
Por sendi kaj forigi dubojn, uzu nian retadreson: momenton@gmail.com

La rakonto devas havi ĝis maksimume 2 paĝojn (spaco 2, literotipo "times new roman", 12)

Skoto William Auld naskiĝis la 6an de novembro 1924 en Suda Anglio, kie lia patro provizore laboris, sed ekde 1933 la familio Auld revenis al Skotlando. Tie William lernis, laboris kiel instruisto kaj emeritiĝis kiel vicedro de liceo. En 1942-46 William servis en la brita flugarmeo, interalie kiel piloto en Spitfire.

Esperantisto ekde sia 14a jaro, Auld post la reveno el la armeo komencis verki en Esperanto poemojn por Esperanto en Skotlando, kaj en 1952 li debutis antaŭ la internacia legantaro per poemciklo Spiro de l' Pasio en la poemaro Kvaropo. Kvar jarojn poste aperis lia 25-ĉapitra poemego La infana raso, poste kelkfoje reeldonita, interalie ankaŭ en la nederlanda, portugala kaj hungara tradukoj. Poste li verkis aliajn poeziajn librojn en Esperanto, kaj multaj el liaj prozaj libroj kaj eseoj estis kolektitaj en Pajleroj kaj stoploj (1997).

Kvankam unue Auld diskoniĝis kiel poeto, lia posta agado estis tre multfaceta. Li kompilis antologiojn anglan (1957), skotan (1978) kaj Esperantan (1958) kaj Novan Esperantan Krestomation (1991). Jam ses eldonoj de lia progresiga lernolibro Paŝoj al plena posedo aperis. Li estis vicprezidanto de Universala Esperanto Asocio (UEA) kaj prezidanto de la plej alta lingva instanco de esperantlingvanoj Akademio de Esperanto (1979-1983). Ekde 1999 ĝis 2002 li prezidis la Esperantan PEN-Centron. Auld estis redaktoro de la organo de UEA Esperanto, kaj ankaŭ de la literaturaj gazetoj Monda Kulturo, Norda Prismo kaj Fonto, kaj dum pli ol kvarona jarcento li redaktis La Britan Esperantiston (1973-2000).

Eminenta estas lia traduka agado. Interalie li tradukis la sonetojn de Ŝekspiro kaj ties verkojn Epifanio aŭ Kiel vi volas kaj Komedio de Eraroj. Ekde 1993 William Auld intime kunlaboras kun ruslanda eldonejo Sezonoj, ĉe kiu aperis kelkaj liaj tradukoj inkluzive de la trivoluma epopeo de Tolkien La Mastro de l' Ringoj entuziasme akceptita de la legantaro kaj la kritiko.

Lia literatura agado premisis lian kandidatigon por la literatura Nobel-premio. (Estis unua fojo kiam iu estis kandidatigita pro verkoj en Esperanto.) Kvankam ne li, sed Grass, ricevis tiun premion, la kandidatigo kaŭzis multajn pozitivajn menciojn pri Auld kaj pri la Esperanta literaturo en la amaskomunikiloj tra la mondo (Times, Daily Telegraph, Le Monde, La Stampa, BBC kaj multaj aliaj), kaj internacia elektantaro, formita dank' al la iniciato de La Ondo de Esperanto, proklamis lin La Esperantisto de la Jaro 1998. Li estas ankaŭ plurfoja laŭreato de la Belartaj Konkursoj de UEA, laŭreato de la premio Onisaburo Deguchi (1995) kaj de la Esperanto-Kulturpremio de Aalen (2000). Lia librokolekto en 2001 estis transdonita al Skota Nacia Biblioteko en Edinburgo.

Nelonge antaŭ sia forpaso Auld donis sian konsenton pri reelddono de La Mastro de l' Ringoj, kiu aperos venont-jare. Homoj mortas, sed iliaj verkoj povas esti senmortaj, kaj la memoro pri William Auld vivos tiom longe, kiom en la mondo restos legantoj de libroj en Esperanto.